

### Revizora raporto de la kontoj de ISAE 1954.

Mi ekzamenis la kaslibron kaj paperojn senditajn al mi de s-ro S. Alexandersson, sekretario-kasisto, kaj mi trovis ĉion en bona ordo, escepte de la du sube menciitaj punktoj:

1. Laŭ miaj kalkuloj la konto de Francujo sumiĝas al fr. 55938 (= sv.kr. 821). Sekve en la bilanco, la bonhavo sumiĝas al sv.kr. 1655.84.
2. La konto de Usono sumiĝas al \$ 0.70 (= sv.kr. 3.60). Sekve en la bilanco, la ŝuldoj sumiĝas al sv.kr. 1398.25, kaj la kapitalo estos sv.kr. 257.59.

Mi devas gratuli la sekretario-kasiston pro lia daŭra laboro kaj pro la klareco de la prezentado de la kontoj.

A. A. M. Whitehead, Britujo, 31/5/55.

### Diversaj Informoj.

*Brazila kotizo.* Pro valutaj cirkonstancoj ni devas ŝanĝi la kotizon por Brazilo. La kotizo de nun do estas 110 kruzjeroj.

*Scienca kongreso.* D-ro inĝ. G. Hamming, vicprezidanto de ISAE kaj unu el la redaktoroj de Scienca Revuo, en letero al la estraranoj proponis ke ISAE havu propran kongreson kun scienca karaktero, ne en la kadro de la UK. La kongreso havu kiel temon: Rilato inter scienco kaj lingvo.

*Biblioteko.* La bibliotekisto de ISAE, d-ro C. A. ten Seldam, pro longa vizito al Anglujo, transdonis la bibliotekon de ISAE al s-ro F. Winkel, Plataanweg 18, Rotterdam, Schiebroek, Nederlando. Ni dankas al d-ro ten Seldam pro lia kunlaboro. Li pretigis sliparon pri la biblioteko.

*Societo por Internacia Lingvo,* gvidata de dro Bormann, sendis kelkajn cirkulerojn al ni. La societo havas eminentajn honorajn korespondajn membrojn en multaj landoj. La adreso estas Blücherstrasse 17, Flensburg—Mürwik, Germanujo.

*Informileto pri Esperanto, Interlingue, Interlingua* estas dissendita de d-ro C. A. ten Seldam, Middenweg 117 boven, Amsterdam Oost, Nederlando.

*Terminologio.* Hidraŭliko (akvotekniko). S-ro P. Touron, B. P. 122, Alĝer, Alĝerio, preparas Hidraŭlikan terminaron (Akvotekniko kaj flankaj teknikoj: veterobservado, akvoobservado, geologio, ktp.) kaj petas kunlaboron de interesitaj fakuloj.

*Peranto por Francujo:* S-ro E. Bidoit, château de Grésillon, Baugé (Maine et Loire). La jarkotizo estas 600 frankoj. Pri specialaj aferoj oni skribu al: Scienca Revuo ĉe G.E.E., Pedagogia Muzeo, 1 rue du Périgord, Toulouse.

*Nova delegito por Italujo:* S-ro P. Marelli, piazza Napoli 40, Milano. Ni esprimas nian dankon al la malnova delegito d-ro inĝ. E. Aprosio.

*Delegito por Novzelando:* Prof. C. J. Adcock, 45 Queen Street, Wellington C. 4. La jarkotizo estas 12 anglaj ŝilingoj.

Sven Alexandersson, sekretario-kasisto.

### Protokolo de la Jarkunveno de I.S.A.E.

okazigita dum la 40-a U.K. en Bologna, 4.8.1955.

Ĉeestis 22 personoj. La kunveno komencis je 11.40. La ĉeestintoj proponis ke la kunvenon prezidu d-ro I. Lapenna kaj la protokolon faru prof. B. Popoviĉ. Akceptiĝis ankaŭ jena tagordo:

1. Malfermo
2. Estrara raporto pri 1954
3. Ekonomia raporto pri 1954
4. Revizora raporto
5. Demando pri senŝarĝigo de la estraro
6. Decido pri jarkotizo 1956
7. Propono pri statutŝanĝo
8. Propono pri „Ora libro”
9. Terminologia laboro
10. Aliaj demandoj
11. Fermo

1—5: Lapenna malfermis la kunsidon kaj Popoviĉ tralegis la raportojn (kun buŝa aldono pri la nuna stato). ISAE havas ĉirkaŭ 400 membrojn en 19 landoj kaj la landaj societoj ekzistas en Britujo, Francujo, Nederlando kaj Jugoslavio. La gazeto nun aperas tute regule, sed la eldonisto havas perdojn pro malgranda abonantaro. La diskuto montris bezonon de pli vasta agado en ISAE kaj por Scienca Revuo, ĉar ISAE kaj ILEI estas plej gravaj fakaj organizaĵoj por plenumo de niaj taskoj post la Rezolucio de Unesko. Post la diskuto la jarkunveno senŝarĝigis la pasintjaran estraron.

6. Pro graveco de Scienca Revuo la decido pri jarkotizo estas prokrastita, por esti fine diskutata kune kun la problemo de Scienca Revuo.

7. Propono pri statutŝanĝo ne estas akceptita en la proponita formo (ke estrarano povas esti nekomitatano), sed en la punkto 6 de la Statuto estu aldonita post a., b., c., ankaŭ:

„d. La komitato rajtas alekti ankoraŭ maksimume tri pliajn komitatanojn”.

8. Dum la diskutado pri la Ora Libro montriĝis la bezono eldoni specialan jubilean libron, sed kelkaj estis pesimismaj koncerne la financan flankon. En la diskuto Lapenna kaj Popoviĉ informis pri la longa perletero diskuto inter estraranoj kaj kelkaj komitatanoj. Kvankam montriĝis deziro ke tia libro ne estu el multaj fakoj, la jarkunveno konsideris la fakton ke la plano estas jam detale farita por diversfaka libro kaj decidis ke oni eldonu ĝin sub la titolo „Sciencaj studoj”. Popoviĉ transprenis la taskon organizi, kun helpo de J. Vranĉiĉ, la antaŭmendojn kaj vendadon dum la kongreso en Kopenhago, post publika rekomendo de Lapenna.

9. Popoviĉ informis pri la raporto de R. Haferkorn al la 33-a

kongreso de Germana E. Asocio kaj Shinoda informis ke Sc.-Teknika Terminaro certe aperos antaŭ la fino de la jaro, kvankam ĝis nun venis nur 50 mendoj el Japanujo kaj 150 el aliaj landoj. La jarkunveno esprimas sian dankon al la verkintoj kaj eldonantoj, sugestas al la estraro organizi bone la vendadon dum la kongreso en Kopenhago, kaj krome substrekas la gravecon de plua terminologia laboro por efektiviĝi plenan S.T.T.

10. Lapenna informis ke la ĝisnunaj prelegoj de I.S.U. aperis<sup>1)</sup> en libroformo, kaj se ili estos sukcese vendataj, la novaj prelegoj aperos regule ĉiujare.

Post longa diskuto pri la financa krizo kaj tro modesta amplekso de Sc. Revuo, kiun diskuton partoprenis preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj, la jarkunveno decidis fari al la redaktoroj kaj al la estraro jenajn sugestojn:

- a. aperigadi 6 numerojn en unu jaro, pli ampleksajn ol ĝis nun kaj sur pli dika papero;
- b. la enhavo de la unuopaj numeroj estu alterne el naturo esploraj sciencoj kaj el soci-historiaj sciencoj;
- c. la unuajn du numerojn (el ĉiu branĉo po unu) eldoni kiom eble plej bone kaj grandkvante propagandcele, kaj tiam malfermi grandan kampanjon ĉie (en gazetoj, dum kunsidoj, ktp.) por pli granda nombro de aktivaj membroj kaj de abonantoj, lasante al la abonantoj-nemembroj eblecon aboni nur unu el la branĉoj de la revuo.

Samtempe la jarkunveno esprimas sian koran dankon al la eldonisto Muusses kaj petas lin transpreni ankaŭ nun la riskon por realigo de la lasta menciita sugesto.

Sekve de la supraj sugestoj la jarkunveno rajtigas la estraron plialtigi la membrotizon de ĝisnunaj 12 al 18 anglaj ŝilingoj.

Fine la jarkunveno akceptis proponon de prof. Fernandez sendi al s-ro Clemente Estable, Urugvajo, gratulon kaj solidarecon pro lia interveno en la Programkomisiono de Unesko en Montivideo.

11. D-ro Lapenna fermis la kunsidon je 13.50, invitante la ĉeestantajn membrojn aktive kunlabori por realigi la faritajn decidojn.

Protokolinto B. Popoviĉ.

#### Subnoto.

La estraro de ISAE akceptis ĉiujn decidojn kaj sugestojn de la kongresa kunveno. Nur unu voĉo estis kontraŭ pliampleksigo de la revuo.

9-10-1955

B. Popoviĉ.

<sup>1)</sup> aperos pr. en novembro 1955 (Red.)

#### Alvoko al referendumo.

Inter aliaj decidoj de la jarkunveno en Bologna, troviĝas la propono pri statutŝanĝo, kiu tekstas:

En la punkto 6 de la Statuto estu aldonita post a., b., c., ankaŭ „d. La komitato rajtas alekti ankoraŭ maksimume tri pliajn komitatanojn.”

La senco de tiu propono estas ebligi al la komitato trovi pli facile homojn kapablajn kaj pretajn kunlabori en la estraro, eĉ se iu el ili ne estis pli frue elektita komitatano. Laŭ la p. 11 de la Statuto por ĉiu statutŝanĝo necesas referendumo. Tial mi invitas ĉiujn membrojn voĉdoni por aŭ kontraŭ la proponita ŝanĝo. La respondoj atingu la sekretarion-kasiston S. Alexanدرسون (Ulricehamnsvägen 16 nb, Johanneshov, Svedujo) plej malfrue 30 tagojn post aperigo de ĉi tiu alvoko.

Krome ĉiu membro rajtas (p. 8 de la Statuto) postuli referendumon pri ĉiu decido de la jarkunveno, 3 monatojn post aperigo de la decidoj.

B. Popoviĉ, ĝen.sekretario de ISAE.

#### DE LA TERMINOLOGIA SEKCIO.

Per letero mi petis d-ro Holmstrom (reference al miaj rimarkoj sur p. 66 de Scienca Revuo 7, n-ro 26-a de mia artikolo „Universala Dekuma Klasado kaj Terminologio”), deklari sin preta funkcii kiel informcentro por verkontoj de esperant-lingvaj fakterminaroj aligendaj al ISO/FID-terminaroj. D-ro Holmstrom en letero de la 4-a de aŭgusto 1955 respondis jenon (angle):

„Estimata sinjoro,

Mi ĝojas pri via interesiĝo pri la farado de plurlingvaj terminaroj por specialigitaj fakoj, ĉar helpo al tio estas la parto de la Unesko-programo, pri kiu mi estas kompetenta, tiom kiom koncernas la sciencojn kaj teknologion ... (Parenteze, Unesko publikigos dum la venonta monato de d-ro Wüster „Bibliography of Monolingual Scientific and Technical Glossaries Vol. I - National Standards” kiu estas suplemento al la jam ekzistanta „Bibliography of Interlingual Scientific and Technical Dictionaries”).

Rilate al la uzado de UDK en terminaroj, Unesko opinias ke en multaj kazoj estas utile dividi specialan terminaron laŭ ĉapitroj aŭ partoj, konformaj al la diversaj sekcioj de la temo, kaj ke, kiam tio estas farita, la ĉapitraj titoloj estu akompanataj de la koncernaj UDK-indicoj. Tio plifaciligas kompili bibliografiojn en kiuj la tereno de ĉiu terminaro estas klare indikita kaj eviti senutilan interkovriĝon kaj duobligon de la leksikografia laboro. Kondiĉe ke tio ne malfruigas la progresadon de urĝa laboro, Unesko ankaŭ ne vidas kontraŭaĵon referenci kaj aranĝi la terminojn por la apartaj nocioj interne de ĉiu ĉapitro laŭ la UDK-sinsekvo, kion d-ro Wüster rekomendas